

Aĉetenda, tre aĉetenda...

Manlibro pri instruado de Esperanto. Red. K. Kováts. Partizánske/Hago: Espero/ILEI, 2005 (2-a eld.). 150p. 21cm. ISBN 8096904264. Prezo: € 7,50

Ĉiu el ni havas sian amatan ĉevaleton. Mi pensas, ke tiuj, kiuj uzas la neFundamentan -io por landonomoj estas morale apenaŭ super la nivelo de De Beaufront kaj Blinkenberg. Stefan MacGill pensas, ke tiuj, kiuj ne opinias, ke la verbo estas ĉio en la frazo, ne komprenis ion ajn pri lingvo-instruado.

Stefan estas unu el la kontribuintoj al la recenzata libro. La aliaj estas multaj, sed tamen ne estas senutile rapide listigi ilin: A. Orellana Rojas, B. Dockhorn, D. Charters, H. Lundberg, I. Kocięba, K. Kováts, L. Szilvási, M. Molnár, P. Baláž, R. Petrović, V. Ivanov kaj Z. Tišljár. El tiu listo vi povas vidi kiom da malsamaj kompetentoj kuniĝis, por krei la libron, kio estis ebligita de la formo de malproksima kunlaborado pere de la komputila reto.

Male ol oni povus supozi, la multeco de aŭtoroj en redakte difinita kadro igas la libron pli valora, ĉar ĉiu aŭtoro verkas nur pri tio, kion li aŭ ŝi plej bone konas kaj plej profunde ŝatas.

Tiom, kiom mi povas juĝi, kaj pri la partoj pri kiuj mi havas ian fakan scion, ekzemple pri la lingvo-instruaj metodoj kaj ilia historia apero kaj malapero, mi trovis la materialon en la libro unuaranga. Same unuaranga ĝi ŝajnas al mi pri ĉiuj aliaj kampoj, kiujn ĝi pritraktas per mallongaj sed efikaj artikoletoj. Tio, kio

ofte detenis min de legado de pedagogiaj tekstoj, estas la parol-abunda stilo kun longaj frazoj en kiuj oni dubas ĉu la lingvo, kiun oni renkontas, estas la malnova greka aŭ Esperanto. Male ĉi tiu libro estas freŝe malsama kun mallongaj kaj fakt-abundaj tekstoj. Se vi volas scii, kiun metodon sekvi en difinita situacio, kiun ekzercon uzi, kiun ekzamenon celi por viaj lernantoj, la informoj estas tie. Temas pri speco de enciklopedieto pri instruado de Esperanto en 115 paĝoj, tre utila por niaj instruantoj, kiuj ne jam lernis lingvoinstruadon en normalaj naciaj lernejoj kadroj.

Ĉu kritikendaj partoj? Mi vere ne povas trovi ion tian. Mi povas nur iom ŝerci kun Stefan MacGill pri la graveco donata al transitiveco de verboj en Esperanto. Transitiveco ja estas problemo por homoj el almenaŭ kelkaj difinitaj gepatraj lingvoj, sed ne nepre kaj ne samgrade por ĉiuj, kiel supozigas la verko. Sed eble tio estas nur unu el miaj amataj ĉevaletoj. Konklude: aĉetenda, tre aĉetenda, se vi ne sukcesas elpresi ĝin el la reto, kiel supoze eblos, sed nur post iom da tempo.

Renato Corsetti

